# La NASKa Fasko


Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

merkredon, la 5-an de Julio, 2017 • numero du

## Hodiaŭ • Today

- ★ **8:30 – 12:15 atm:** Lecionoj
- ★ **2:00 – 3:00 ptm:** Ĝenerala informo pri la KER-ekzamenoj (Komuna Eŭropa Referenckadro)
  *Flowe 110*
  Katalin priskribos por ni la sistemon de oficialaj Esperantaj ekzamenoj, kaj kial vi eble volus ekzameniĝi. La KER-ekzamenoj mem okazos lundon.
- ★ **7:00 – 8:00 ptm:** Enkonduko al la Kino-Teatro-Festivalo (KTF)
  *Flowe 110*
  Pli da informo estas sur la dua paĝo

# Kio okazas en gufujo?



*de Hans (Hanso) BECKLIN*

Saluton! Mi nomiĝas Hanso, via gufestro, kaj mi volas inici vin en la sekretojn de la NASKa gufujo! Se vi estis membro de la kursara fejsbuko-grupo, vi eble jam legis la plenajn detalojn pri nia nokta trinkejo. Tamen, se vi ankoraŭ ne legis ĝin aŭ simple ne informiĝis, jen resumo de la ĉefaj gravaj detaloj pri la natura medio de ĉiu ululanto:

- La gufujo malfermiĝos ĉiun vesperon de NASK 30 minutojn post la anoncita finiĝo de la lasta programero. Se finiĝo de programero ne estas anoncita, la gufestro klopodos avizi partoprenantojn pri la komenciĝa horo. La gufujo fermiĝos je la 11 kaj duono p.t.m.
- La gufujo situos en la tria etaĝo, kaj uzos la kuirejon kaj la salonon dum ĝia daŭro. En la gufujo oni tetrinkas, babilas, tabulludas, legas, kantas kune aŭ sola, kaj ĝenerale ĝuas kvietan, plene esperantan etoson.
- Por aliĝi al la gufaro, oni aĉetas gufkarton. La karto kostas 10 dolarojn kaj estas truebla dekfoje. Kontraŭ ĉiu truo oni povas aĉeti aŭ unu tason da teo kaj kekson aŭ tri keksojn.
- Gufoj povos elekti inter multaj altkvalitaj specoj de teo kaj tizano. Aparte menciinda estas la bongusta malvarma hibiska tizano, kiu estas sukerita kaj plaĉos al tiuj, kiuj ŝatas limonadon kaj malvarmajn trinkaĵojn!

# Saluto de la NASK-administranto

*de Ellen EDDY*



Saluton NASKanoj kaj KTFanoj,

Mi ĝojas ke vi sukcese alvenis al la universitato William Peace, espereble senprobleme. Kelkaj el vi eĉ havis la okazon partopreni la kongreson de E-USA, do jam bone konas la aranĝojn. Mi estas la administranto de NASK kaj provis faciligi vian restadon ĉi tie. Mi interŝanĝis e-mesaĝojn kun vi kaj provis solvi antaŭviditajn problemojn. Tiuj kiuj uzis la Fejsbukan grupon (NASK2017) jam ricevis multe da informoj. Sed ofte estas aliaj problemetoj je la komenco kiujn ni ankaŭ povas solvi se vi sciigas min. Mi loĝas en #107 do frapu aŭ lasu mesaĝon sur la pordo. Vi ankaŭ povas telefoni aŭ sendi tekstmesaĝon al 206-300-9724. Mi esperas ke ĉio iros glate kaj ke vi ĝuos vian partoprenon en ambaŭ programoj.

# Ĝuu, parolu, kaj ne timu!

*de Lee (Liĉjo) MILLER (English version on the next page)*
*Liĉjo kune instruas la post-bazan nivelon kun Thomas (Tomaso) ALEXANDER*

Mi amas, ke vi decidis veni al NASK kaj pasigi tempon inter aliaj homoj kiuj parolas Esperanton. Mi esperas ke viaj ok tagoj ĉi tie estos plenplenaj kaj feliĉaj, kaj ke post via foriro vi havos karajn memorojn pri la novaj amikoj, novaj spertoj, kaj novaj kapabloj.

Esperanto vere ne estas io “supernatura” aŭ “mistika”, sed ĝi ja estas forta kaj interesa fenomeno en nia mondo. Jam dum pli ol 130 jaroj ĝi ekzistas kaj progresas, kaj ĝi daŭre allogas novajn homojn kiuj volas lerni kaj paroli ĝin.

Bonege, ke vi estas en tiu grupo! Niaj NASKanoj estas tre diversaj. Ni estas miksaĵo de junuloj kaj maljunuloj, studentoj kaj laboristoj kaj emeritoj, malseriozuloj kaj seriozuloj. Rigardu nian grupon ĉi tie ĉe la




universitato. Vi malofte vidos kurson en kiu lernas tiom da malsamaj homoj. Sed tio estas la forto de Esperanto. Ĝi malkovras ion en ĉiu el ni, kio malgraŭ eksteraj malsamecoj, tamen en la koro vere samas.

Mi havas nur du mallongajn konsilojn komence de NASK. Unue, ne hezitu paroli. Ĉu vi timas erarojn? Ne timu. Se vi farus neniun eraron, vi ne devus esti ĉi tie. Kaj vi havas tre bonan teamon de spertaj instruistoj kaj parolantoj kiuj helpos vin.

Due, konsciu ke ni ne scias kion vi pensas. Se vi ne komprenas ion, levu la manon kaj diru “Mi ne komprenas!”

Se io ne estas en ordo, informu nin. Se vi bezonas ian helpon, bv. peti ke iu helpu vin. Nia celo certe estas ke vi multe laboru kaj lernu, sed ankaŭ ke vi estu kontenta.

I love that you decided to come to NASK and spend time with other people who speak Esperanto. I hope that your eight days here will be full and happy, and that after you leave you'll have fond memories of new friends, new experiences, and new abilities.

Esperanto really isn't anything "supernatural" or "mystical", but it is in fact a strong and interesting phenomenon in our world. For more than 130 years it has existed and progressed, and it continues to attract new people who want to learn and speak it.

Awesome, that you're in this group! Our NASK participants are a very diverse group. We're a mix of young and old, students, workers, retired people, serious and not so serious. Look at our group here at the university. You won't often see a class with so many different people learning together. But that's the strength of Esperanto. It uncovers something in each one of us which, in spite of external differences, nonetheless in our hearts is the same.

I have two brief pieces of advice at the beginning of NASK. First, don't hesitate to speak. Are you afraid of errors? Don't be. If you didn't make any errors, you wouldn't need to be here. And you have a great team of experienced teacher and speakers here to help you.

Second, remember that we don't know what you're thinking. If you don't understand something, raise your hand and say "Mi ne komprenas!" If something isn't right, let us know. If you need help with something, ask someone to help you. Our goal is certainly for you to work hard and learn, but also for you to be satisfied.

Amike,
Lee Miller (Liĉjo)
licxjo@gmail.com

*Por la nacia festo, la manĝejo proponis benjetojn kun la koloroj de la Usona standardo*



# Laboro kaj humuro

*de Katalin KOVÁTS kaj Sylvain LELARGE*
*Katalin instruas la superan kurson, kaj Sylvain instruas la meznivelan*



Mi instruas jam la 7an fojon en NASK kaj ĝis nun ĉiam estis granda plezuro kun neforgeseblaj memoraĵoj, spertoj, renkontiĝoj kaj amikiĝoj. Imagu ke en la nuna grupo estas deko da personoj kiujn mi renkontis dum miaj unuaj NASK-oj en 1996 kaj 1998 kaj alia deko el miaj pli postaj NASK-oj. Do, ne miru, se mi sentas plezuron reveni al kara famlia rondo. La nuna jaro estos tamen iom alia en miaj kursoj. Mi planas laborigi miajn kursanojn, kune NASK-i novajn ideojn, konceptigi projektojn kaj komenci ellabori ilin. Mi esperas ke multaj en la supra grupo havos plezuron kunagadi kaj utile pasigi la kursotempon.

Saluton al ĉiuj! Mi estas Sylvain, tutfranca franco, sed vivas jam delonge en Nederlando, kie mi instruas, kompreneble, la francan. Kune kun mia edzino Katalin, mi gvidas jam de 15 jaroj kaj kun granda plezuro Esperanto-kursojn dum la universalaj kongresoj. Aŭtente interkonatiĝi, elkore dividi niajn vivspertojn, humurplene filosofumi pri niaj diversaj realoj: jen por mi kio kreas daŭripovan lerndinamikon. Mi antaŭĝojas niajn matenojn.



# Denove NASKanoj partoprenas en KTF

*de Derek ROFF*

Venu al la enkonduko al Kino-Teatro-Festivalo (KTF) je la 7a horo vespere (merkrede), en Flowe 110, por lerni pri la diversaj projektoj kaj elektoj, kun kiuj vi povos kunlabori. Tie vi spektos la ĉarman infanlibron, *Kapitano Katarino: La Pirato Alergia je Gluteno*. La verkisto, Alex Miller prezentos ĝin, kaj ni son-registros la tekston de ĝi dum NASK/KTF. Ni ankaŭ registros la dialogojn kaj vortlistojn de *Esperanto: Learning and Using the International Language* de David Richardson (kromnomo: La Richardson-Libro). Alena Adler preparas bonegan muzik-programon, kion ŝi priskribos. Ni faros filmeton, kaj ni preparos novan numeron de Kviztorio, ŝerca demando-ludo, kiun ni prezentos al ĉiuj je la antaŭlasta vespero. Do, venu al la enkonduko ĉi-vespere, kaj trovu vian lokon en unu aŭ pli el tiuj projektoj.

# Muzika koncerto - kune ludu aŭ kantu

*de Alena ADLER*

Saluton karaj! Skribas al vi Alena, kiun iuj el inter vi konis antaŭe kiel Ĵenja. Mi nun feliĉe havas nur unu personan nomon, taŭgan por multaj lingvoj.
Mi skribas al vi kadre de la muzika fako de KTF, kiu prezentos koncerton preskaŭ fine de la dua semajno, posttagmeze en merkredo. Mi esperas ke multaj volontos kunprezenti! Mi bezonas kaj spertajn instrumentistojn, kaj lertajn, memfidajn kantistojn por kanonoj aŭ harmonioj, kaj multajn kunkantantojn sen ajna specifa sperto kiuj volontas kunkanti ĝue kun grupo. Mi esperas ke vi ĉiuj trovos min sub la nomo Alena Adler ĉe Facebook, kaj sendos al mi mesaĝon pri viaj apartaj interesoj aŭ talentoj rilate al muziko. Mi mem provludos ĉiutage kaj helpos diversajn aliajn prepariĝi, sed ne ĉiuj devos provludi tiom ofte por partopreni. Ĉefe ni amuziĝu kaj kune kreu belan muzikon!